

Post la jam pli frue anoncita 27-paĝa traktajo de prof-o d-ro O. Reiersø l pri „Diferencialaj ekvacioj de specimendaraj distribuoj”, la sama aŭtoro en decembro 1950 publikigis novan traktajon, 11-paĝan, kies titolo estas: „Transiro per diferencialaj ekvacioj de probablodensoj al karakteriza funkcio kaj inverse”. Ambaŭ traktajojn eldonis la Sociekonomia Instituto de la Universitato en Oslo, Norvegujo. Se iu kompetentulo pretas recenzi ĉi tiujn verkojn, li bonvolu anonci sin ĉe la redaktoro.

$$= 089.2 = 061.239(100)(058.2) \cdot 1950 + 1951''$$

Jarlibro de UEA, 1950, 2a Parto. (Komp. recenzon en Sc. R. 2 116). 48 paĝoj. Enhavas i.a. raporton de la estraro, liston de sciencaj verkoj kaj disertajoj en Esperanto (1949–50), cetere certe ne kompleta. La paĝojn 21-46 plenigas la dua parto de la Marista Terminaro. Kvankam tio ne estas mia fako, mi kredas tamen, ke mi trovis kelkajn preserarojn sur p. 23: ~~korkapabla maristo~~ (ĉu pensi pri Freud?). Mi supozas ke oni intencis skribi: „~~korkapabla maristo~~”, simpla traduko de la angla „~~able-bodied seaman~~”; „mekanista” supozeble devas esti „mekanikista”. Kaj mi ankaŭ trovis: ĉefa ingeniero (por maŝinestro) (ne kun ĝ, sed kun g); ĉu preseraro, aŭ intenco? Cetere, ĉu maŝinestro sur ŝipo estas „ingeniero”, eĉ se la anglalingvanoj diras „engineer”? Ja en la angla lingvo maŝino povas nomiĝi „engine”. En Esperanto la vorto maŝinestro (maŝinisto) ŝajnas al mi preferinda.

La paĝoj 28-45 prezentas laŭalfabetan liston de maristaj terminoj kun iliaj tradukoj en la angla, franca, germana, kaj hispana lingvoj. Sur paĝo 40 mi trovis „sana atesto”, esprimo miaopinie nepre netaŭga. Temas, evidente, pri atesto pri saneco aŭ sanstato. Oni do diru tion, aŭ, se oni preferas malpli longan formon: *prisanstata*, *prisaneca*, aŭ simple *sanatesto* aŭ *prisana atesto*, kies analizo estus: (pri sano)a atesto. Sur la sama paĝo troviĝas la vorto „*senventa*”. La germana traduko estas nepre substantivo. Ĉu tiu traduko estas erara, aŭ ĉu la termino devas esti „*senvento*”? Sur paĝo 35 troviĝas la vorto (*ŝip*)*korpo*, kies tradukoj estas egalaj al tiuj kiuj sur paĝo 41 troviĝas post la vorto (*ŝip*)*ŝelo*, dum post la termino *ŝipkorpo*, sur la sama paĝo, troviĝas aliaj tradukoj. Ĉu eraro? Fine, sur p. 36 mi trovis „*magneta vario*”; mi rimarkigu ke Enciklopedia Vortaro de Wüster jam donis por tiu signifo: „*magneta deklino*”, kiu termino ŝajnas al mi preferinda.

Ni ĝoju ke nia faka vortararo denove kreskis.

Jarlibro de UEA, 1951, 1a Parto. 256 paĝoj; nur por membroj.

$$\{629.12 + 656.6\} : 001.4 = 089.2$$

Marista Terminaro de Komandanto Peter Clissold. Eldono de UEA. 62 paĝoj kun ilustraĵoj. Prezo 1½ ŝil. + 1 p. por afranko, aŭ 5 rpk. Represajo el la Jarlibroj de UEA por 1949 kaj 1950. Vidu la ĉi-supran recenzon. La paĝoj 8-37 respondas al la paĝoj 30-59 de la dua parto de la Jarlibro por 1949, kaj la paĝoj 38-62 al la paĝoj 22-46 de la dua parto de la Jarlibro por 1950. Mi konstatis ke la korkapabla maristo dume jam fariĝis korkapabla.